

2a DIMANĈO DE ADVENTO - 6an de decembro 2015

ĈIU HOMO SPERTOS LA SAVON DE DIO - Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 3, 1-6

En la dekkvina jaro de la regado de Tiberio Cezaro, kiam Poncio Pilato estis provincestro de Judeo, kaj Herodo tetrarko de Galileo, lia frato Filipino tetrarko de regionoj Itureo kaj Traĥonitido, kaj Lisanio tetrarko de Abilenio, kaj la ĉefpastroj estis Hanaso kaj Kajafaso, tiam la parolo de Dio trafis Johanon, filon de Zakario, en la dezerto. Kaj li iradis tra la tuta regiono ĉirkaŭ rivero Jordano, predikante bapton de konvertiĝo por pardono de pekoj, laŭ orakolo en la libro de profeto Jesaja:

**Voĉo de iu krianta en la dezerto:
 ,Pretigu la vojon al la Sinjoro,
 rektigu Liajn padojn!
 Ĉiu krutaĵo pleniĝos,
 kaj ĉiu monto kaj monteto malaltiĝos;
 la malrektaj vojoj rektiĝos, la kaj la malglataj glatiĝos.
 Ĉiu homo spertos la savon de Dio`**

Kiam ni legas la evangelion, ni povos ĝin tute kompreni se ni rilatos al ĝi kiel la unuaj legantoj aŭ aŭskultantoj, kiuj ne konis la sekvon. Kaj en la nuna legaĵo (Lk 3, 1-6) ni vidos, kiel Luko surprizas sian publikon.

Skribas Luko: *"En la dekkvina jaro de la regado de Tiberio Cezaro..."* La komenco de ĉi tiu ĉapitro estas emfaza, solena, ĉar la evangeliisto volas atendigi surprizon, kaj vera surprizo ĝi estos. La unua nomo citita estas Tiberio Cezaro. Tiutempe la potenculoj taksis sin dioj, kaj Luko komencas per la persono plej proksima al Dio, eĉ dio mem, la imperiestro. *"...kiam Poncio Pilato estis provincestro de Judeo, kaj Herodo tetrarko de Galileo, lia frato Filipino tetrarko de regionoj Itureo kaj Traĥonitido..."* Rimarku kiel pompa estas ĉi tiu frazo, kaj laste estas menciita iu *"... Lisanio..."*, persono preskaŭ nekonata, *tetrarko de Abilenio..."*, kiu estas la nuna Orienta Lebanono, *"...kaj la*

ĉefpastroj estis Hanaso kaj Kajafaso". Kial du ĉefpastroj? Da ĉefpastroj ja estis unu. Kial ĉio tio? Ĉar la menciitaj nomoj estas sep. Tiu nombro, sep, en la Biblia stilo, reprezentas plenecon, kompletecon, tutecon. Se ni volus traduki tion en nunan esprimon, ni diru, ke "tio estis la tiuepokaj G7 (sep granduloj) de la landoj loĝataj de la juda popolo", la plej potencaj potenculoj tiulandaj.

Nu, jen la surprizo: "*... la parolo de Dio trafis...*". Kiun trafos la Dia parolo? Ni povas elekti inter Tiberio Cezaro, la imperiestro, mem Dio, kaj ankaŭ la ĉefpastroj, reprezentantoj de Dio surtere. Kiun elektos Dio por konigi sian parolon? Kiam Dio volas influi la historion – jen la surprizo – Li zorge evitas lokojn kaj personojn sanktajn aŭ religiajn, ĉar Li scias ke tie Lia mesaĝo estas klare rifuzita. Surprize, neniun el la potenculoj, sed iun "*...Johanon, filon de Zakario, en la dezerto*". Kion faras Johano en la dezerto? Kiel dekok-jara filo de pastro, li estus devinta aliri la templon por pruvi, ke en li ne estas ecoj malpermesantaj pastrecon, kaj poste ofici kiel pastro, same kiel sia patro.

Tiel ne agis Johano. Johano jam en la sino de sia patrino estis plena de la Sankta Spirito: li estas la homo de la Spirito, ne de la rito. Tial li lasas la socion kaj iras en la dezerton, malproksimen de Jerusalemo kaj de la templo. La parolo de Dio trafas ĝuste lin.

"li iradis tra la tuta regiono ĉirkaŭ rivero Jordano...". Jordano estis la rivero trairita de la juda popolo por eniri la landon promesitan. Tiu sama lando nun estas lando de sklaveco, do forlasinda.

"....., predikante bapton...". La vorto "bapto ne havas la nunan liturgian signifon: ĝi signifis simple "enmergiĝon", kaj ĝi estis rito, dum kiu oni enmergiĝis tute en akvon, kaj per tio la enmergiĝinto simbole mortis, kaj eliris kiel persono nova. "*...de konvertiĝo*".

Do en la prediko de Johano la bapto estas simbolo de konvertiĝo. Johano alvokas al tiu rito kiel imago de konvertiĝo. En La greka lingvo tiu vorto estas du-signifa; ĝi povas montri revenon al Dio kaj al la religio, kaj Luko rifuzas tiun interpreton por akcepti la alian, la ŝanĝon de la konduto kaj de la kutimoj, nome la ŝanĝon de si mem.

Jen kial tiun instigon al ŝanĝo Johano ne povis direkti al la reganta pastraro, ne ema al ŝanĝoj. Lia mesaĝo estas: "Ŝanĝu vian vivon". Kion signifas konvertiĝo? Ĝis nun vi vivis por vi mem, ekde nun vivu por la aliaj," "*... laŭ orakolo en la libro de profeto Jesaja*. "Voĉo de iu krianta en la dezerto:"*Pretigu la vojon al la Sinjoro, rektigu liajn padojn! Ĉiu krutaĵo pleniĝos, kaj ĉiu monto kaj monteto malaltiĝos; la malrektaj vojoj rektiĝos, la la malglataj glatiĝos. Ĉiu homo spertos la savon de Dio*".

Tiu himno (Jes 40, 1-3) apartenas al la tiel nomata "libro de konsolo", la dua parto de la libro de Jesaja, verkita, je la fino de la ekzilo, de poeto nekonata; ĝi instigas la popolon al forlaso de la lando de sklaveco.

La lasta versiklo de Jesaja tekstis "Ĉiu homo vidos la gloron de Dio". Luko ĝin modifas: "*Ĉiu homo spertos la savon de Dio*". La gloro de Dio videblas per la savo de ĉiu homo. Estas grava tiu rimarkigo "ĉiu homo". Neniu homo ne spertas la amon de Dio. Ne ekzistas personoj ne invititaj al la konvertiĝo realigonta la regnon de Dio. En la destino de ĉiu homo estas la sperto de la gloro de la Sinjoro, de la amo de la Sinjoro.

Diros pli malfrue Petro (Agoj 10,38), ke Dio deklaris al li, ke neniu homo estu juĝita malpura, do ne amata de Dio. Estas tiu la anonco de la bona novaĵo. La parolo de Dio al Johano estas invito al vivoŝanĝo, kaj ĝi koncernas la tutan homaron, sen esceptoj.